



Kajeroj **el la Sudo**



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



Salou



N-ro 28. Oktobro-Novbro-Decembro 1995



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Martín Bustín Benito**

Apartado de Correos 4143

E-03080-ALICANTE (Hispanio)

Sekretario: **Jesús de las Heras Giménez**

Av. Juan Carlos I, 24, 2-G. Edificio Nva. Ronda

E-30008-MURCIA (Hispanio)

Kasisto: **José M^a Bernabeu Franco**

Gral. Primo de Rivera, 8

E-03369-Callosa de Segura (Alicante)

Monsendoj de kotizoj kaj abonoj al la n-ro 28.09.722.429.

en Libreta de Caja Postal, Of.0412. Sen aldona sendokosto.

Redaktoroj de la revuo:

Antonio Marco Botella

Av. Compromiso de Caspe, 27/29; 9^o. C

E-50002 ZARAGOZA (Hispanio)

Miguel Fernández Martín

C/ Santa Genoveva, 58, 6^o. C.

E-28017 MADRID. (Hispanio)

Kovrilo: Simbola monumento de Salou, kie okazis la ĉi-jara asembleo de HALE

Enhavo:

La asembleo de HALE	3 pĝ.
Malsanaj mensoj	5 pĝ.
1.995: Jaro de la Virinoj	8 pĝ.
Administra angulo	11,-"
La signifo de la verbo «skafandri»	11,-"
Kotiz-tabelo por 1996	14,-"
Bonvolu ridi...sed ne tro!	15,-"
La Movado en kaj ekster Iberio	17,-"
Racio kaj revolucio	19,-"
La agresema faŝismo	23,-"

NOTO: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

La Asembleo de HALE



Je la 16a posttagmeze de la 11a de novembro 1995 kunvenis en asembleo en ampleksa salono de hotelo «Belvedere» de Salou (Tarragona) malalta nombro de HALE-membroj por debati longan tagordon proponitan de nia prezidanto, kies ĉefa celo estis solvi la gravajn problemojn de la Asocio devenantaj el certa neglekto pri la kunlaboro de nia anaro kaj el la trijara provizoreco de nia gvida komitato pro tute neatenditaj demisioj de la antaŭaj responsuloj.

Prezidis la kunvenon k-do Martín Bustín, kaj sekretariis en la asembleo k-do

Antonio Marco, pro neĉeesto de la HALE-sekretario.

Unue oni legis kaj aprobis la protokolan antaŭan akton. Sekvis, laŭ la antaŭvidita tagordo, la temo pri la financoj de HALE, kaj oni legis la Konto-Etaton koncernan al la jaro 1994, jam aperintan sur paĝoj de **Kajeroj** de la ĉi-jara numero Januaro-Febr-Marto 1995. Konstateblas la malekvilibro inter ordinaraj Enspezoj kaj Elspezoj, klare deficitaj, kies kaŭzoj oni devas atribui al la neakurata pago de multaj el niaj membroj kaj al la malaltaj kotizoj neaktualigitaj de la jaro 1988. Feliĉe por la Asocio, la kosto de nia gazeto kaj elspezoj de redaktado-administrado estas nekredeble malaltaj, kaj de tempo al tempo honestaj idealistoj helpas eviti deficitajn per malavaraj donacoj. Do, la nuna favora saldo tute ne esprimas la veran ekonomian situacion de HALE, kiu nepre devus sin subteni per siaj propraj rimedoj.

Oni aprobis la Konto-Etaton kaj interkonsentis reguligi la malekvilibron.

Pri la 3a punkto, nia prezidanto, ofta partoprenanto en SAT-kongresoj kaj LEA-kunvenoj ekster nia lando, esprimis la favoran opinion ekzistantan en niaj medioj pri nia organo. K-doĵ A. Marco Botella kaj Miguel Fernández, ambaŭ redaktoroj, konfirmis al la ĉeestantoj la komunan decidon forlasi la redaktadon de nia bulteno, tuj post kiam kompetentaj kamaradoj sin proponos por okupi tian postenon. Ĝis tiu momento ambaŭ restos plenumante la taskon kiel ĝis nun.

Unu el la plej malfacilaj problemoj por tiu ĉi asembleo estis la elekto de nova komitato. Ja pluraj membroj de la Asocio estis perletere konsultitaj, kun negativa rezulto. Aŭdinte la opinion de la ĉeestantoj, oni elektis la sekvajn kamaradojn por jenaj postenoj:

Prezidanto: Martín Bustín Benito
Sekretario: Jesús de las Heras Giménez
Kasisto: José M^a Bernabeu Franco
Redaktoroj: Antonio Marco Botella kaj
Miguel Fernández Martín

Post aprobo de la nova komitato, oni traktis la temon pri korekto de iama decido pri aliĝo de HALE al HEF. Ne necesas faki pri juro por kompreni, ke tiu aliĝo, laŭstatute, ne eblas. Veras, ke neniam HEF enmiksigis en la aferojn de HALE, nek postulis ian ajn dependecon aŭ informon. Temis nur pri konveneco, ĉar la prezidanto López samtempe rolis kiel HEF-sekretario, kaj evidentas, ke li ne povis esti en du lokoj samtempe, sed fakte, ke tiu decido estis kontraŭstatuta, do la asembleo senvalidigis la iaman decidon.

La 6a punkto de la tagordo temis pri la uzo de la havaĵo de nia Asocio. Ekzistas libroj iam donacitaj de SAT al fiaskinta unua LEA-o fondita en Tortoso en la jaro 1978. La libroj venis al la manoj de la SAT-Peranto en Hispanio, k-do Ramón Manau, kiu, tuj post la fondo de HALE, metis ilin je la dispono de nia Asocio. Per tiuj libroj kiel bazo oni decidis krei Libro-Servon en la sino de HALE. Cetere, k-do Bustín ricevis de SAT-broŝurservo kelkajn librojn pageblajn post eventuala vendado. Per ambaŭ kvantoj da libroj, parte nun gardataj de Manau kaj, parte, de broŝurservo, oni povas komenci la vendadon, ĉu sub la respondeco de Bustín aŭ de Bernabeu. Tion devas ili mem interkonsente decidi, ĝis veno de voluntulo por okupiĝi specife pri la Servo. Oportune aperos en **Kajeroj** listo kaj prezoj de la vendeblaj libroj.

La 7a punkto de la tagordo temis pri kotizoj. Kiel antaŭe dirite, niaj

financoj tute ne povas subteni la elspezojn de la Asocio, tial oni nepre devas aktualigi niajn kotizojn. Unuanime oni decidis starigi jenajn abonprezojn kaj kotizojn, kiuj ekfunkcios ekde la 1a de januaro 1996:

Kotizo HALE-anoj (ankaŭ SAT-membroj)	800 ptoj.
Abonantoj loĝantaj en Hispanio	1000 ptoj.
Abonantoj loĝantaj en eksterlando (aŭ ekvivalento)	1300 ptoj.

Je la fina parto de la asembleo oni proponis starigi agadplanon, sed, konsiderante tion for de nia atingo pro certa malintereso de multaj el niaj membroj, oni konsentis rekomendi al nia anaro, ke ĉiu faru sian eblon por organizi Esperanto-kursojn en la diversaj sindikatoj kaj speciale kunlabori kun la HALE-komitato en la ordinaraj taskoj.

Tuj poste k-do Antonio Marco informis la asembleon pri la fino de sia verko pri la historio de la Hispana Laborista Esperanta Movado, tio estas nia propra historio, kaj tiurilate petis helpon de la Asocio por eldoni ĝin per antaŭmendo de certa kvanto da ekzempleroj. Li informis ankaŭ, ke li faris similan peton al Broŝurservo de SAT kaj SAT-Amikaro, kies respondojn li ankoraŭ atendas.

Oni promesis al li tian helpon.

Kaj sen pli da traktendaj aferoj finiĝis la kunveno je la 18a vespere.

La Redakcio

.....

Malsanaj mensoj

En la lasta n-ro de **Laŭte** (119), sur paĝo 29 aperas artikoleto sub la titolo **Fia maskita malamo**, en kiu la aŭtoro, per distordita prezento de la faktoj kaj perversa intenco, pretendas transformi simplan frazon en gravan ofendon kontraŭ la homaj rajtoj de la individuoj. Li aludas frazon el artikolo de k-do J. de las Heras, aperinta en **Kajeroj el la Sudo** n-ro 22 je la komenco de 1994, en kiu nia k-do rakontas siajn impresojn pri la UK okazinta en Valencio en 1993: li plendis pri la etoso tute ne frateca nek universaleca, facile palpebla inter la kongresanoj, sopiris pri reveno al la "interna ideo" de Esperanto, en kiu ajn kongreso kolektiĝas esperantistoj en

«rondo familia», kaj esprimis abomenon pri la ofta krokodilado en multnombraj okazoj en tiu UK. Kaj li citis, kiel unu plian agreson kontraŭ la spirito esperantista de la Kongreso, saluton fare de loka reaktia politikulisto en krokodila lingvo. Al tiu honesta opinio, legitima por idealisma esperantisto, s-ro M. atribuas fian maskitan malamon. Malfacile oni povas koncepti, per kia perversa lenso li rigardis la artikolon por alveni al tia konkludo.



En **Kajeroj** jam ni konas la naciismajn piruetojn de s-ro M. (kies nomon ni preferas forgesi), kiu sub la masko de *identeco*, *imperiismo* kaj novaj strangaj leksemoj de li sensece inventitaj, klopodas kaŝi siajn arkaikajn, kadukajn kaj regresemajn teoriojn. Li neniam verkas pri laboristaj problemoj, neniam batalas por progresemaĵoj, neniam strebas por homaranismaj konvinkoj. Lia kredo estas la radikala etna naciismo, ĝuste en momentoj, kiam la kolektivo, kiun li pretendas defendi, havas sian propran registaron, kaj kiam liaj eventualaj

streboj, kune kun la kolektivaj de laboristoj, tiom povus kontribui al nia kaŭzo, strebado pli ol necesa kontraŭ la nunaj burĝaj regantoj, kun la celo konstrui modernan socion pli justan por la laboristaro. Tia estas la homo, kiu kritikas honestan opinion de idealisto kaj eĉ kuraĝas senhonte akuzi lin, ke tiu agis malbonintence kaj sin maskis pro malamo...

Konkrete en tiu kazo de li aludita, li grave eraras plurfoje. Ekzemple, li ekspliku al la kolektivo laborista-esperantista, kial li diras, ke la saluto de la menciita politikisto en la UK estis en la *kataluna lingvo*, anstataŭ substreki, ke tio okazis en la valencia lingvo, t.e. en alia etna lingvo, kiel reale okazis kaj tiu minoritato amas kredi... Ĉu tio ne estas naciisma misformo de s-ro M., kiu inkliligas nin pensi pri la ideo milfoje proklamita de liaj samopiniantoj, ke Valencio apartenas al tiu neniam ekzistinta katalunisma imperio de ili nomata "Katalunlandaro"?

En ĉiu bona naciisto ekzistas ĉiam la kredo pri imperiismaj konvinkoj. Asocie kun tiu sama ideo, sendube estas bona okazo, por ke s-ro M. ekspliku al ni kial, kiam liaj samopiniantoj (katalunismaj esperantistaj junuloj) kongresis en la provinco Murcio, ili disvastigis la ideon, ke ankaŭ tiu teritorio estas "unu el la katalunaj landoj". Kaj tiu ne estas escepta ekzemplo, ni povas citi multnombrajn aliajn, en kiuj, laŭ ili, aragonaj reĝoj fariĝis tuj katalunaj, ankaŭ teritorioj valenciaj aŭ murciaj mirakle fariĝas katalunaj ktp... La fanatikismo estas tiel blinda, ke ĝi tute kapablas eĉ ŝanĝi la historion. Sendube li estas unu el tiuj naciistoj, kiuj hontigas eĉ siajn proprajn partianojn.

Private, mi fieras pri la bona amikeco de multaj katalunoj, kaj la legantoj de miaj prihistoriaj paĝoj tre bone scias pri mia strebado por elstarigi sur centoj kaj centoj da paĝoj la batalon de la kataluna popolo por la libero kaj laboristaj celoj. Sed tiu ne estas la katalunismo, kiun vi defendas, s-ro M., kaj la naciismaj-imperiismaj ideoj, kiujn vi kaj viaj amikoj defendas, havas karakterizojn identajn al tiuj subtenitaj de diktatoro Franco (kiun vi mencias) sed sub alia nomo. La naciismo ŝanĝas ja la nomon sed ne la agresemon kaj senracion, do nur mencias la ideon pri imperiismo, ne gravas ĉu kataluna, franca, hispana aŭ de iu ajn lando, kiam ni estas ĉe la sojlo de la 21-a jarcento, estas, minimume, iom pli ol malsaĝa vanteco, kaj donas honton pli ol brilon...

Ni ne malkovras novan mondon, se ni konfirmas niajn kontraŭnaciismajn konvinkojn, milfoje esprimitajn en **Kajeroj**. Ni ripetis ne unu solan fojon, "ke nia batalo, la batalo de progresemaj laboristoj, konsistas en ĉiutaga konkero de parceloj da libero kaj demokratio, ke landlimoj devas malaperi kiel esprimo de divido, diskriminacio kaj apartigo de homoj (ja tio estas komenco de abomena rasismo), ke ni devas paroli unu lingvon, esperanton, krom la propra, ke naciismo, kiam ĝi radikaliĝas, ĝi murdas, detruas kaj disvastigas malamon kaj morton. Kaj ekzemploj ne mankas nun en la mondo".

Kiel komplementon de tiuj ideoj plene laŭaj al la aktuala momento de la socia evoluo en la mondo, mi volas indiki la opinion de honesta homo, la pacifisto kaj filozofo k-do Giordano Moya Escayola. Nia kataluna k-do Moya ĵus aperigis verkon, **Survoje al universala civilizacio**, en kiu li studas per trafa rezonado la disvolviĝon de plej diversaj civilizacioj, de la neolitika ĝis la aktuala epokoj. Kiam li studas la temon pri la nunaj naciismoj, li konkludas: "oni ne povas ne rigardi la nacionalismon kiel


retropaŝon, sed multe pli bedaŭrindaj estas la etnaj naciismoj, kiuj disigas la homaron kaj kondukas ĝin denove al pasintaj koŝmaroj”. Kaj iom pli poste li aldonas: “la retroiro al la pasinteco, por divido de la mondo laŭ supozaj etnoj, havas nenian prosperan estontecon. Nun la mondo estas planeda vilaĝo kie la landlimoj kaŭzas nur malutilon, kaj la libera cirkulado de varoj, homoj kaj ideoj fariĝas nepre necesa...”

La legado de tiu interesa libro estas mia plej bona rekomendo por la legantoj de tiu ĉi artikolo, sed tio estas vana indiko por s-ro M., kiu pli plezure ŝatas aŭdi la moŝtan episkopon de Solsono, kiam li furioze vipas la homojn ne parolantajn sian etnan lingvon. Kaj... s-ro M., permesu al mi senpagan konsileton: kiam vi parolos en niaj laboristaj medioj, bonvolu ŝanĝi vian leksikon, forgesu la vorton nacio kaj uzu nian terminon popolo, kompreneble se vi intencas ankoraŭ resti inter ni iom da tempo por prediki la sanktan gloron de viaj fanatikaj "patriotismaj" teorioj. Kvankam la plej multaj el ni tute ne atentis vian neutilan diskurson, tiel kadukan kiel la teorio pri la naciismo.

Antonio Marco Botella

1995, Jaro de la Virinoj

Kvankam la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj estis aprobita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 10-an de decembro 1948, kun bedaŭro oni povas konstati, ke tiu komuna celo (akceptita en la tuta mondo kiel universala progresema doktrino) ne tre pozitive evoluis ekde tiu jaro. La agresoj kontraŭ la plej fundamentaj rajtoj de la individuoj ne nur ne regresas, sed oni apenaŭ al kutimiĝis denunci ilin antaŭ UNO, kaj ofte eĉ ne meritas la atenton de la t.n. civilizita mondo. Inter ili elstaras la agresoj kontraŭ la virinoj, kiuj suferas multnombrajn diskriminaciojn, speciale gravajn en certaj malriĉaj aŭ feŭdismaj landoj, kie la dumjarcenta humanisma batalo por la virinaj rajtoj ne okazis. Jen kial la proklamon de 1995 kiel *Jaro de la Virinoj*, fare de UNO, ni rigardas pli ol oportuna. Kaj ni kaptas ĉi ŝancon por denunci la situacion de la virinoj en certaj partoj de la mondo, ĉi-foje en la riĉaj landoj ĉe la Persa Golfo, kie mono ne mankas, sed rajtoj aŭ liberoj de la personoj estas konceptoj tute nekonataj, kaj oni



Sarah Balahagan.

jurisprudencas laŭ kriterioj antaŭaj al la mezepoko.

De tempo al tempo venas al ni novaĵo pri unu el tiaj kazoj tie ordinare okazantaj, kaj tio estiĝas, kiam la persono atakata en siaj legitimaj rajtoj aŭ en sia fizika persono ne toleras maljuston kaj respondas al la perforto per perforto. Jen la kazo de 16-jara filipina knabino, Sara Balahagan, laboranta kiel servistino en Saudi-Arabio, kiu antaŭ du jaroj mortigis sian mastron en Abu Dabi, verŝajne sindefende post plurfojaj seksatencoj liaflankaj.

La filipina servistino estis kondamnita de la tiea jurisdikcio al plurjara prizono, sed la verdikto reviziigis kaj en tiu dua okazo transiĝis al mortpuno. Internacia kampanjo evitis, unue, la komplican silenton kutiman ĉe tiaj kazoj kontraŭ virinoj

en islamaj landoj, due la ekzekuton, kaj fine instigis multajn ĵurnalistojn esplori kaj malkovri aliajn similajn dramojn. Efektive, eke de tio, ĵurnalistoj el diversaj landoj malkaŝis ĉi-specajn maljustaĵojn, kaj ĉi faktoj tuj disvastiĝis tra la tuta mondo. Ekzemple, nun oni scias, ke antaŭ nur tri monatoj virino kaj ŝia filino estis publike ekzekutitaj en Dahrán. Oni akuzis la virinon, ke ŝi mortigis la edzon. Pluraj aliaj kazoj, ne malpli ol dekduo en Saudi-Arabio dum la lastaj tri jaroj, estis zorge kaŝitaj por eviti reagon kompareblan kun tiu pri la filipina junulino. La sendefendo de la kondamnitoj estis/-as absoluta kaj ne nur ĉe la juĝejoj, sed ankaŭ ĉe la socio, kiu sin montras surda al eventualaj rezonadoj, kiam la akuzitoj estas virinoj. Laste venis al ni la novaĵo, ke Sara Balahagan ne estos ekzekutita, sed ricevos kiel punon, krom enkarcerigo, *cent vipobatojn...* Terure! Ĉu tio ne ekvivalentas, pli-malpli, al la morto?

Kompreneble, kiam tiuj skandaloj skuas la konsciencon de la publika opinio, abundas pretekstoj religiaj, politikaj, sociaj, kaj eĉ oni parolas pri antikvaj moroj por pravigi tion nepravigeblan: la diskriminacion de la virinoj

en socio, kiu negas al ili eĉ la minimumajn rajtojn kiel personoj. Konkrete en la landoj ĉe la Persa Golfo ekzistas absoluta kaj netolerenda sendefendo de la virino antaŭ la leĝo. Ĝenerale, virino estas kondamnata de la socio antaŭ ol ŝi ricevas kondamnon de juĝistoj, kiuj siaflanke kundividis samajn fanatikajn regresemajn ideojn.

En tiu dura kritiko kontraŭ la jurisprudenco kaj la manko de garantioj en tiu regiono de la mondo, permesu al mi etendi saman energian kritikon al tiuj kolektivoj aŭ personoj de la t.n. civilizita mondo de Okcidento, kiuj ĉe ni, en tiuj ĉi konkretaj kazoj, pretendas pravigi la aplikon de tiuj kruelaj leĝoj kaj diskriminacioj en la nomo de certa respekto al la originaleco de tradiciaj kulturoj kaj religiaj kredoj de tiuj popoloj. Mi aludas pri la naciismaj kolektivoj, kiuj, defendante etnismajn teoriojn, intencas konservi abomenajn kutimojn kaj kruelajn uzojn devenantajn el kadukaj tradicioj, kiujn ili difinas kiel kulturon. Ekzakte en la nomo de la vera *Kulturo*, ni protestas per ĉiuj niaj fortoj!

SAT kaj LEA-oj ne povas resti indiferentaj antaŭ tiuj eventoj okazantaj en la mondo, en kiuj in-seksaj homoj suferas maljuston kaj diskriminaciojn. Kaj, kiel membroj de laboristaj kaj kulturaj asocioj, ni devas individue kaj kolektive protesti kontraŭ faroj kiel la menciita, konstituanta gravan atencon kontraŭ la rajtoj kaj vivo de la filipina laboristino. Gravas, ke ni mobiliziĝu en tiuj kazoj, kie kaŝe staras unu el la maljustaĵoj plej abomenaj ankoraŭ ekzistantaj en la mondo: la kruelo aplikata en la nomo de kadukaj leĝoj kaj de certaj antikvaj kulturoj. Ni instigas niajn kolegojn reagi kontraŭ tiuj reakciaj sistemoj kaj personoj per artikoloj aperontaj en niaj gazetoj kaj per protestoj sendotaj al la diplomataj reprezentantoj en la respektivaj landoj. Tiuj protestoj savis ĝisnune la vivon de la menciita mortkondamnita laboristino. En aliaj kazoj, malfeliĉe, protestomanko kondukis la aferon al fatala rezolucio: ekzekuto.

Fari nian eblon por disvastigi Esperanton en la aziaj kaj afrikaj landoj, kie la virinoj ne akiris al si almenaŭ la juran statuson perbatalitan en nia mondregiono, instigi ilin batali por siaj specifaj rajtoj, povas esti alia pozitiva konkludo de tiu ĉi artikolo en la *Jaro de la Virinoj*.

La Redakcio.

Administra angulo

Pagis sian respektivan abonon jenaj kamaradoj kaj asocio:

Justo Estañ Canales (Granada)	2000 ptojn.
Jaime Benito Cedo (Zaragoza)	1000 ptojn.
Emilio Pérez Gimeno (Zaragoza)	800 ptojn.
Miguel Gutiérrez Adúriz (Santander) 94/95	1600 ptojn.
Montserrat Cabrafiga (Francio) 94/95	1600 ptojn.
Carme Llapart (Figueres)	800 ptojn.
Ana Manero (Madrid) 94/95	1600 ptojn.
Kantabra Esperanto-Asocio (Santander) 94/95	1600 ptojn.
Entute	<u>11000 ptojn.</u>

Ni dankas la pagintojn kaj petas tiujn, kiuj ne tion faris laŭlonge de la jaro, plenumi kiel eble plej baldaŭ tiun devon.

.....

La signifo de la verbo «skafandri»

Antaŭ unu jardeko Retto Rossetti publikigis artikolon titolitan **Kion scias la poeto** (1), en kiu li plurfoje stumblis sur la glitiga vojo de la Esperanta semantiko. Por ĝustigi liajn erarojn, mi publikigis **Kion ne scias la poetoj (kaj la aliaj) pri la transitiveco de verboj** (2). Rossetti ne dankis min pro la konsiloj pri plibonigo de sia lingvouzo; male, li obstine republikigis sian artikolon sen poluri ĝin laŭ miaj precizigoj (3). Tio ja odoras je senrespondeco.

En tiu ĉi artikolo mi prezentos unu ekzemplon de la Esperantaj vortoj, kiujn li misuzis. Temas pri la verbformo *skafandri* en la sekvaj citaĵoj ĉerpitaj el la kolekto da eseoj **Arto kaj naturo** (Budapeŝto, 1989).

1. "...ĉi poemo ne estas nova, kaj ĝi estas de 'Shakespeare' ĉefe laŭ la opinio de la fervora usonano, kiu ĝin skafandris en Oxford, Anglio..." (pĝ. 56).
2. "kaj nun mi sondas mian memoron por skafandri kelkan nombron de tiaj verboj" (pĝ. 73).
3. "Sed dum Forge skafandras en la homa animo aŭ vojaĝas per

tempomaŝino...” (pĝ. 124).

Kion povas signifi *skafandri* en la tri frazoj surpaperigitaj de poeto Rossetti? **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV) informas, ke la substantivo *skafandro* estas “hermetika vesto, garnita per vitra kaj metala kapujo, kaj regule provizata per freŝa aero, per kiu oni povas iri kaj labori subakve”. *Skafandristo* estas “metiisto, kiu laboras en skafandro”. Ambaŭ venas de la samsignifaj francaj vortoj *scaphandre* kaj *scaphandrier*. Ne registrita en tiu vortaro estas la verbformo *skafandri*, kaj mi neniam renkontis ĝin en verboj de aliaj esperantistaj aŭtoroj. Kial, do, Rossetti aŭdacis ne nur krei tiun verbformon sed ankaŭ doni al ĝi signifon, kiu tute ne rilatas al subakva laboro?

Estas eble konsekvence derivi la signifon de la verbo *skafandri* surbaze de analogio kun aliaj Esperantaj verboj pluformitaj surbaze de substantivoj signifantaj vestaĵojn.

a. ĉapelo. PIV registras *ĉapelita* kun la signifo “portanta ĉapelon”. La verbo, do, estas *ĉapeli* (tr); en la franca *chapeauter*.

b. ŝui. Francaj-Esperantaj vortaroj tradukas *chausser* per *ŝui* (tr), *piedvesti*, kaj *surmeti ŝuojn*. La sama verbo troviĝas en la Esperanta-angla vortaro de M.C. Butler kun la angla ekvivalento *to shoe* (tr).

c. mantelo, robo. En la angla-Esperanta vortaro de Fulcher kaj Long, la angla verbo *to cloak* estas tradukita per *manteli* (tr) kaj la samaj vortaristoj esperantigas *to robe* per *sin robi*, t.e. “vesti sin per robo”.

ĉ. kapuĉo, vualo, masko. En PIV oni trovas, ke *kapuĉi*, *vuali* kaj *maski*, ĉiuj tri transitivaj, signifas kovri parton de la korpo per la koncernaj vestaĵoj. Ili respondas al la anglaj verboj *to hood*, *to veil* kaj *to mask*.

d. zono. Ankoraŭ unu ekzemplo ĉerpita el PIV estas *zoni* signifanta “ĉirkaŭligi per zono”.

e. ganti. Laŭ PIV ĝi signifas “surmeti ganton al iu”. Komparu F. *ganter* kaj A. *to glove*.

f. jupo. Ne registrita en PIV estas la laŭregule verbigita formo *jupi*, sed ekvivalentoj ekzistas en la angla *to skirt* kaj en la franca *juponner* “provizi, vesti per subjupo” (jupon).

Konforme al la vortformado en Esperanto kaj la difinoj en PIV, evidentas, ke la rekta verbigito de nomo de vestaĵo donas al la verbo la signifon “provizi iun aŭ ion per la menciita vestaĵo”, kaj tiaj verboj estas transitivaj, ĉar ili esprimas agon, kiu pasas de subjekto al objekto. *Skafandri*, do, devas signifi analogie kaj logike vesti, kovri aŭ provizi per skafandro.

La verbo *skafandri* elcerbigita kaj uzita de Rossetti en la ĉi-supre cititaj frazoj ne estas senchava, ĉar ne estas racie imageble, kiel oni povas vesti agojn per subakve uzebla ekipaĵo! Frazo 1 temas pri iu usonano, kiu, leginte librojn kaj manuskriptojn en biblioteko, trovis aŭ malkovris poemon. En la dua frazo Rossetti esploris aŭ traserĉis en sia memoro por ĉerpi ekzemplojn de verboj. Frazo 3 informas, ke aŭtoro Forge rigardis aŭ fosis en la homa animo. Rossetti mizere mispaŝis, ĉar li ne uzis en siaj frazoj klare kompreneblajn verbojn kiel la sekvajn: rigardi, observi, ekzameni, (tra)serĉi, (el/pri)fosi (f.), esplori, enketi, sondi, skolti, rekognoski, prospektori ks. kun la celo identigi, malkovri aŭ riveli.

La procedo de verbigo de vestaĵ-substantivoj ekzistas ne nur en etnolingvoj kiel la angla kaj franca, kiel indikas la ĉi-supraj ekzemploj: Paralelaĵoj troviĝas ankaŭ en la hispana lingvo:

- a. calza- calzar: piedvesti.
- b. velo - velar: vuali.
- c. corona-coronar:kroni.
- ĉ. venda- vendar: vindi.
- d. faja - fajar: zoni.

Tamen, oni devas esti singarda pri la signifo de etnolingvaj verboj. Dum en Esperanto la verbo ĉiam signifas, aŭ devas signifi, kovri per iu vestaĵo, en etnolingvoj la verboj povas havi alian, kelkfoje figuran signifon, rilatantan al la maniero uzi la koncernan vestaĵon. Du tiaj verboj en la hispana estas:

- a. capa - capear: mantel-ludi, toreadi.
- b. zapato-zapatear: piedfrapi, fari ŝudancon.

Rimarku, ke en tiuj du ekzemploj la verba finaĵo estas -ear anstataŭ -ar. Tio sugestas, kiel estu eble doni al la radiko *skafandr-* la signifon “uzi tiun veston por subakva esplorado” per aldono de la sendefina sufikso um: *skafandrumi*. Analogie eblas traduki *capear* kaj *zapatear* per *mantelumi* kaj *ŝuumi*.

Bernard GOLDEN

Gloso

En la franca lingvo *scaphandre* estis uzata en la jaro 1775 kun la

signifo *savzono*; la nuna signifo de la vorto datiĝas de 1800.

La nomo de la uzanto de *scaphandre* havas du formojn: *scaphandrier* (1805) kaj la variaĵo *scaphandreur* (1868). Etimologie ĝi estas kunmetaĵo de du helenaj vortoj, *skaphé* barko kaj *anér/andros*, viro, do la signifo estas bark-homo.

Notoj

1. Reto ROSSETTI. **Kion scias la poeto. Filologo**, n-ro 33-34 1987, pĝ. 7-9. Represita en **Literatura Foiro**, n-ro 113, 1988, pĝ. 18-19.
2. Bernard GOLDEN. **Kion ne scias la poeto (kaj la aliaj) pri la transitiveco de verboj. Filologo**, n-ro 35, 1987, pĝ. 6-8. Represita en: **Esperanto en Skotlando**, n-ro 156, 1991, pĝ. 14-17, kun la titolo **Kion ne scias la poetoj pri la transitiveco de verboj**.
3. Reto ROSSETTI. **Kion scias la poeto. Pĝ. 72-73 en Arto kaj naturo**, Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio; 1989. 126 pĝ.

KOTIZ-TABELO POR 1996

Membreco de HALE kun revuo por SAT-membroj	800 ptoj.
Jarabono Kajeroj el la Sudo por Hispanio	1000 ptoj.
" " " " por eksterlando	1300 ptoj.
Jarabono al Sennaciulo	2400 ptoj.
Baza kotizo al SAT-membro, sen revuo	1600 ptoj.
Abono al Sennacieca Revuo	600 ptoj.
Membro-abonanto pagas entute	4000 ptoj.

Niaj gekamaradoj devas atenti jenajn rimarkojn:

- Membro-abonantoj pagas plenajn bazan kotizon kaj abonon.
- Help- kaj grup-membroabonantoj pagas minimume la duoblon de la baza kotizo kaj plenan abonon.
- Emeritaj membro-abonantoj pagas la duonon de la baza kotizo kaj plenan abonon.
- Senlaboruloj kaj junaj (ĝis 25-jaraj) membro-abonantoj pagas la duonon

de la baza kotizo kaj duonan abonon.

— Familianoj pagas la duonon de la baza kotizo.

— Krom la kotizo, ankaŭ SAT-membro, kiu daŭre deziras ricevi la asocian organon **Sennaciulo**, devas pagi sian abonon al ĝi.

— Membro-abonantoj, krome, ricevas la jaran kajeron **Sennacieca Revuo**, sen plia abonpago.

— Ĉiuj membroj, escepte de la familianoj, aŭtomate ricevas la dujaran SAT-adresaron.

BONVOLU RIDI... SED NE TRO!

Ruza junulo

Lernanto malsukcesinta en la kursofinaj ekzamenoj cerbumas, kiel informi la patron pri sia fiasko. Fine, pensinte, ke li kaŭzos malpli da doloro, se li prezentos kvazaŭoptimisman kompenson, li diras al la patro:

— Paĉjo, en la venonta jaro vi havos grandan profiton, ĉar vi ne devos elspezi monon por novaj lernolibroj!

La patro, tuj perceptinte la signifon de tiu informo, per ironia tono respondas al la filo:

— Ho, jes, mia filo! Mi dankas vin pro via penado ŝpari mian monon kaj, por respondi al viaj klopodoj, mi aldonos al tiu ŝparo pro lernolibroj la ĉiusemajnan sumon, kiun mi donacas al vi por viaj amuzoj.

Fatala profesio

— La kuracistoj havas multegajn malamikojn en tiu ĉi mondo! — plendis doktoro antaŭ paciento.

— Vi pravas, s-ro doktoro, sed ili havas multe pli en la alia mondo! — respondis malicflegme la paciento.

Naiva demando

Karlo estas en la ĝusta infana aĝo, kiam oni serĉas eksplikon pri ĉio vidata. Hodiaŭ li demandis la patron:

— Diru paĉjo, kial nia najbaro Manuel kisas tiel fervore nian servistinon ĉiam, kiam ambaŭ renkontiĝas?

La patro serene lin respondis:

— Ĉar ili baldaŭ geedziĝos.

— En tiu kazo — konkludas la infano —, ĉu tio signifas, ke ankaŭ vi edziĝos al ŝi, ĉar ankaŭ vi tre ofte ŝin kisas!

Eblecoj

— Vi forveturas hodiaŭ, ĉu ne s-ro Antonio? Ĉu plezurvojaĝo? — demandas unu amiko la alian.

— Tion mi ne scias ankoraŭ, mia kara, mi iras al la malfermo de la testamento de mia mortinta onklo (?).

Matematika menso de infano

Avino intencas konvinki sian okjaran nepon pri frua enlitiĝo kaj dorlote diras al li:

— Jes, mia etulo, la regulo estas, ke okjara infano devas enlitiĝi je la oka vespere, via fratineto naŭjara je la naŭa horo ktp.

La nepeto, unu el tiuj nuntempaj infanoj, kiuj scias ĉiujn respondojn, replikas al la avino:

— Nun mi komprenas viajn plendojn, vi neniam devas enlitiĝi!

Moderna astronomio

Instruisto demandas en lernejo al juna lernanto pri astronomio:

— Ĉu vi scias la nomojn de kelkaj steloj?

— Ho, jes, multajn! — respondas tuj la junulo —. El nia lando kaj el diversaj aliaj: Greta Garbo, Marilyn Monroe, Amparo Rivelles, Sofia Loren, Marisol kaj mil aliajn...

Inter geamantoj

— Diru al mi, Ludoviko, ĉu vi amus min plue, se mi estus tre malproksime de vi?

— Kompreneble, mia karulino! Ju pli malproksime vi estus, des pli forte mi amus vin!

La aĝo de la virinoj

— Kiom da jaroj vi havas, Francisko?

— Ho, se mi devas respondi al vi la veron, mi tute ne scias, ĉar mia patrino estis 28-jara, kiam mi naskiĝis, kaj nun ŝi estas nur 26-jara!

Malsaĝa hundo

La kuracisto energie protestas, ĉar paciento alvenas en la konsultejon post la konsult-horo:

— Ĉu vi ne scias, ke mia konsult-tempo daŭras nur ĝis la kvara? — diras la kuracisto al la malfrualveninto.

La paciento kun bedaŭra tono respondas:

— Jes, s-ro doktoro, sed la hundo, kiu mordis min, ne sciis tion kaj mordis min je la kvara kaj duono!

A. Lapra

Erarkorekto

Kun bedaŭro ni konstatis komposteraron en artikolo verkita de Gonçalo Neves en la antaŭa n-ro de **Kajeroj el la Sudo-27**, pĝ. 8, linio -11. Kie diras *plurfoje renkontebla*, devas diri *plurfoje renkonteblan*.

Ni petas senkulpigon al la aŭtoro de la artikolo, s-ro Neves, kaj al niaj legantoj.

LA MOVADO EN KAJ EKSTER IBERIO

Esperanto-kurso en Burjassot

Niaj gekamaradoj de la Valencia urbeto Burjassot informas nin, ke ili organizis Esperanto-kurson okazontan en la sidejo de la sindikato CNT. Inter iliaj projektoj elstaras la reeldono de la revuo "La Paroña Folio", malaperinta antaŭ du jaroj.

Niaj gekamaradoj petas la abonintojn kaj la eventualajn abonontojn de la revuo kontakti kun la organizantoj:

"Paroña Folio" (Jorge Alcañiz), C/ Independencia 17-9. 46100-BURJASSOT.

La 51-a Kongreso de SAT-Amikaro okazos en la urbeto Orly (departemento Val-de-Marne), de la 6-a ĝis la 8-a de aprilo 1996. La OKK pripensas la eblon inviti du tutmonde konatajn esperanto-artistojn: magiiston kaj akordioniston. Eblas ankaŭ viziti la urbon Fontainebleau kaj ties kastelon. En la kadro de Franca Esperanta Instituto, k-do Marcel Ternant zorgos pri duagrada kaj triagrada ekzamenoj.

La kongreso de SAT-Amikaro sendube sukcesos, samkiel ĉiuj ĝisnune aranĝitaj de niaj najbaroj kaj amikoj.

Aperis Sennacieca Revuo

Antaŭ nelonge aperis la ĉi-jara numero de **Sennacieca Revuo**. Ĝia redaktorino, Krys Ungar, prezentas tre interesan enkondukan artikolon, en kiu ŝi instigas nin, esperantistojn, alfronti la defion de nia esperantisteco, ne nur konvinkante la homojn en niaj respektivaj medioj pri la valoro de niaj principoj kaj, sekve, ke ili havas veran signifon en niaj vivoj, sed montrante per ni mem, ke Esperanto, per sia uzado estas plej taŭga ilo por interkomunikado kaj interkompreniĝo. Ŝi aperigas ankaŭ alian artikolon pri elstara esperanto-verkisto, "Reto Rossetti 1909-1994", vere sukenhavan.

Aliaj interesaj artikoloj, el kiuj konsistas la numero, jenas: "La virino en la paleolitika arto", de Bernard Golden; "Edukaj valoroj de dulingveco en la kazo de nacia lingvo kaj Esperanto", de Zlatko Tišljarić; "Poemoj el Sarajevo", de Zeljko Ivanković; "La interna ideo de D-ro L.L. Zamenhof, de prof. Ĥristo Marinov; kaj "Ek al la Entreprenaj Eŭrokomitatoj", de André Martin, kie tiu ĉi belga sindikatisto, kiu en prelego en la SATEB-a jarkunveno en Barlaston alvokis la laboristaron labori super sennacieca sindikatista terminaro, komentas pri eblaj roloj de Esperanto kaj SAT en la fondo de Eŭropaj Entreprenaj Komitatoj...

La 32-paĝa revuo (sen anoncoj) kostas nur 450 ptojn, krom sendokosto, kaj haveblas ĉe: Sennacieca Asocio Tutmonda; 67, Av. Gambetta; 75020-Paris (Francio).



La 69a SAT-kongreso en 1996

La 69a SAT-kongreso okazos venontjare en Sankt-Peterburgo. Informoj en SAT-sidejo: Sennacieca Asocio Tutmonda; 67, Av. Gambetta; F-75020 PARIS (Francio) kaj ĉe OKK: Sankt-Peterburga Esperanto-Asocio, a/k 348. RU-190000 Sankt-Peterburgo. Rusio.

.....

RACIO KAJ REVOLUCIO

(En la centjariĝo de la morto de Engels)

Pasintseptembre okazis en Madrido la ĉiujara Festo de la Hispana Kompartio (PCE). Tie, laŭkutime — ĉefe lastatempe — kolektiĝas ne nur kompartianoj, sed — eĉ multe pli grandnombre — simpatiantoj al plej diversaj progresemaj tendencoj — anarĥiistoj, trockiistoj, verduloj, revoluciaj sindikatistoj kaj socialistoj... — en etoso festa, tamen ne manka je debataj streboj por difini la indentosignojn kaj strategiojn proprajn al moderna maldekstrularo.

Frederiko ENGELS



Ni ĉeestis kiel simplaj spektantoj. Ja penindus trabati al ni vojon tiukadran por ke ni atestu pri nia dolorige eĉ nesuspektata ekzisto kaj diskonigu niajn proponojn kiel laboristoj-esperantistoj. Sed, kiel sciate, HALE krizas. Ĉu ni kapablos feniksi kaj finfine ekagi? Jen tuj solvenda problemo. Tamen ne pri tio ĉi-loke.

Ni ĉeestis aparte motivitaj de la prezento de libro: Razón y Revolución — Filosofía Marxista y Ciencia Moderna (Racio kaj Revolucio — Marksisma Filozofio kaj Moderna Scienco), hispana versio de Reason in Revolt — Marxist Philosophy and Modern Science, de Alan Woods kaj Ted Grant.

En ĉi momentoj de konfuzo kaj de rearmiĝo de la reakciularo, pretendanta identigi la disfalon de la terura stalinismo kun fiasko de la plej noblaj idealoj pri socia justo, la graveco de ĉi libro por ajntendenca progreseculo eksterordinaras, kiel evidentigas ĝia kovrilpaĝe legebla celo:

Sojle de la XXI-a jarcento, la scienco kaj la filozofio staras kruciĝeje. Observeblas ĉiam pli forta tendenco al mistikismo sur la terenoj de la teoria fiziko kaj la kosmologio. La regantan teorion de la origino de la Universo (“Big Bang”) oni uzas por demonstri la ekziston de Kreinto. Unuafoje post jarcentoj la scienco ŝajnas kredindigi la religian obskurantisman. Novaj genetikaj teorioj hisatas de reakciaj politikistoj provante demonstri, ke la negroj kaj la virinoj malsuperas, ke paŭperisman determinas niaj genoj ktp. Ĉio ĉi pleje utilas al multaj registaroj, kies politiko baziĝas sur socialaj malpliigoj.

Tio, tamen, konstituas nur unu flankon de la monero. Ĉiam pli granda nombro da sciencistoj montras sian malakordon kun la nuna situacio. La ŝpruco de la novaj teorioj de la Ĥaoso kaj de la Komplekso plej signife markas la disvolviĝon de la sciencoj en la lasta jardeko de la XX-a jarcento. La simileco de tiuj ideoj kun la leĝoj de la dialektika materiismo, ellaboritaj de Marx kaj Engels antaŭ pli ol 150 jaroj, fariĝas okulfrapa. Ĉi libro grandparte estas dediĉita al esplorado de la rilato inter la marksisma filozofio kaj la novaj teorioj.

Opinie de la aŭtoroj, la nuna kultura krizo reflektas la sakstraton, kien mondscale venis la kapitalisma sistemo. Elkriziĝo eblas nur per radikala transformado de la socio kaj starigo de aŭtenta socialisma sistemo surbaze de racia planado de la produktivaj fortoj sub demokrata kontrolo far la tuta socio.

La prezento, konceptita — samkiel la libro mem — kiel omaĝo al Frederiko Engels en la centjariĝo de lia morto, konstituus veran sukceson. Inter la publiko, plejparte junaĝa, kiu plenigis la aŭditorion, videblis antikvaj famaj klasbatalantoj. Oratoris la juna studenta aktivulo Juan Ignacio Ramos kaj la admirata Marcelino Camacho, jam historia figuro de la nuntempa hispana laborista movado kaj prezidanto de la sindikato CCOO (Laboristaj Komisionoj), konduke al la parolado de la kimro Alan Woods, kunaŭtoro — kiel dirite — de la libro. La vervo de la brito alportis tiom da fajro, kiom da freŝa aero. La intereso al lia verko iĝis ĝenerala. Woods, persona amiko nia kaj simpatianto — kvankam neesperantisto — al la ekzisto de HALE, volonte permesis, ke ni laŭbontrove esperantigu kaj aperigu en Kajeroj ekstraktojn el la libro. Kaj ĝuste tion ni, certaj pri la objektiva

intereso de la woodsa laboro — almenaŭ kiel tre oportuna debatilo — por la legantoj de nia gazeto, entreprenas ĉi-numere sub la rubriko Racio kaj Revolucio, per la jena teksto el la prologaj paĝoj:

La rolo de Engels

En aŭgusto 1995 oni jubileis la centjariĝon de la forpaso de Frederiko Engels, la homo, kiu, kune kun Karlo Marx, iniciatis tute novan manieron observi la naturon, la socion kaj la homan evoluon. Kiel rolis Engels en la disvolviĝo de la marksisma idearo? Ja la respondo al ĉi demando ne ĉiam justis pri li. Tio ŝuldiĝas, parte, al la genio de Marx — tiel monumenta, ke ĝi nepre ombrigas la kontribuon de lia dumviva amiko kaj kompano — kaj, parte, emanis el la denaska humilo de Engels, kiu ĉiam etigis la gravon de sia propra kontribuo kaj preferis elstarigi la superecon de Marx. Engels faris la komision, ke, ĉe lia morto, oni kremaciu lian korpon kaj disĵetu lian cindron al la maro ĉe Beachy Head, sude de Anglio. Li ne ambiciis monumenton al si. Samkiel Marx, li disdegnis ajnon iel similan al la personkulto. Li volis postlasi nur unu monumenton: la imponan aron da ideoj konstituantaj kompletan ideologian batal-bazon por la socialisma transformado de la socio.

Multaj ne konscias, ke la marksismo etendiĝas preter la politikon kaj la ekonomikon. La filozofio de la dialektika materiismo spinas la marksismon. Marx intencis funde verki pri ĉi temo, sed, bedaŭrinde, la kolosa tasko verki *La kapitalon* malebligis al li tion. Krom liaj fruaj verkoj — kiel *La sankta familio* kaj *La germana ideologio* —, de provoj konsiderindaj, kvankam preparaj, por disvolvi novan filozofion, kaj de la tri volumoj de *La kapitalo* — jam modelo de konkreta apliko de la dialektika metodo al la aparta sfero de la ekonomiko —, la ĉefajn verkojn pri la marksisma filozofio aŭtoris Engels.

Kiu ajn volas kompreni la dialektikan materiismon, tiu devas komenci per ĝisfunda konatiĝo kun *Anti-Dühring*, *Dialektiko pri la naturo* kaj *Ludwig Feuerbach*.

Ĝis kioma grado la filozofiaj skriboj de tiu homo, mortinta antaŭ unu jarcento, eltenis la pason de la tempo? Jen la starpunkto de ĉi verko. Laŭ difino far Engels, la dialektiko konsistas en “la plej ĝenerala leĝaro pri la movo en la naturo, la socio kaj la homa penso”. Ĉefe en *Dialektiko pri la naturo*, Engels baziĝis sur zorga studo de la plej altnivelaj sciencaj konoj siaepokaj por demonstri, ke “lastasekve, la funkciado de la naturo dialektikas”. Nu, jen la fundamenta tezo en ĉi laboro, nome ke la plej gravaj

sciencaj malkovroj en la XX-a jarcento liveras impresan konfirmon pri tio.

Surprizas ne tiom la atakoj kontraŭ la marksismo, kiom la absoluta nescio pri ĝi, kiun evidentigas ĝiaj diskreditantoj. Dum neniu ekpensus meĥanikisti sen studi meĥanikon, ĉiu sentas sin libera por esprimi opinion pri la marksismo sen eĉ plej eta kono pri ĝi. Ĉi verko konstituas provon por ekspliki la bazajn ideojn de la marksisma filozofio kaj montri la rilaton inter ĝi kaj la nuntempa pozicio de la filozofio kaj la scienco. La aŭtoroj intencas verki trilogion kapablan ampleksi la tri ĉefajn komponantojn de la marksismo: 1) marksisma filozofio (dialektika materiismo), 2) la marksisma teorio pri la historio kaj la socio (historia materiismo), kaj 3) marksisma teorio (la teorio de la laborvaloro).

Starte ni kalkulis je ĉi-libra sekcio pri filozofihistorio, sed, vidinte la vastecon de ĉi verko, ni findecidis tiun publikigi en aparta volumo. Ni komencas per skizo pri la marksisma filozofio, nome la dialektika materiismo. Skizo nepra, ĉar temas pri la metodo de la marksismo. La historia materiismo konsistas en la apliko de tiu metodo al la studo de la socia disvolviĝo; la teorio de la laborvaloro rezultas el la apliko de la sama metodo al la ekonomiko. Ja ne eblas kompreni la marksismon sen kompreni la dialektikan materiismon.

La definitiva pruvo de la dialektiko estas la naturo mem. La studo de la scienco okupis la atenton de Marx kaj Engels dum ilia tuta vivo. Engels klopodis produkti finofaran verkon, kie li detale pritraktus la rilaton inter la dialektika materiismo kaj la scienco, sed ne eblis al li, superŝarĝita per la laboro kompletigi la volumojn duan kaj trian de *La kapitalo*, nefinitajn ĉe la morto de Marx. Liaj nekompletaj manuskriptoj de *Dialektiko pri la naturo* vidis la lumon nur en 1925. Tiuj, malgraŭ sia nefiniteco, konstituas tre gravan fonton por la studo de la marksisma filozofio kaj havigas brilajn ekzemplojn pri apliko de la dialektika metodo al la kernaj problemoj de la scienco.

Unu el la problemoj alfrontitaj ĉe verkado de ĉi libro konsistigas la fakto, ke la plimulto el la homoj havas nur duarangan konon pri la bazaj marksismaj tekstoj. Kaj tio bedaŭrindas, ĉar oni povas kompreni la marksismon sole nur legante la verkarojn de Marx, Engels, Lenin kaj Trocki. La tekstoj pretendantaj klarigi "la signifon de Marx", plejparte senas je ajna valoro. Do, ni alprenis la decidon grandnombre aperigi longajn citaĵojn, precipe el Engels, parte, por doni rektan aliron al tiuj ideoj sen ajna "traduko" kaj, parte, kun la espero, ke tio spronos la leganton legi mem la originalojn. Nia opinio, ĉi metodo, kiu ja ne faciligas la legadon de la libro, necesas. Same, ni sentis nin devigitaj enŝovi kelkajn longajn citaĵojn el aŭtoroj, kun kiuj ni malkonsentas, surbaze de la principo, ke ĉiam pli

bonas permesi al niaj oponentoj paroli propravoĉe.

(Artikolis kaj tradukis Miguel Fernández)

[La originala versio (anglalingva kaj 440-paĝa) de la libro mendeblas ĉe: Wellred Publications, P.O. Box 2626, London N1 6DU, Anglio. (Telef: +44171-2511094; Fakso: +44171-2511094) kontraŭ 12 pundoj (inkluzive de sendokostoj); la hispana versio (446-paĝa) de la libro mendeblas ĉe: Fundación Federico Engels, Apartado de Correos 35.167, 28080 Madrid, Hispanio. (Telef: 91-3044248; Fakso: 91-3272966), kontraŭ 2000 pesetoj (plus sendokostoj)].

La agresema faŝismo


En la longa vico de agresoj de naziaj *razkapuloj* en la plej gravaj hispanaj urboj, ni informu al nia antifaŝista legantaro, ke je la fino de oktobro pluraj el tiuj bestaĉoj intencis bruligi la sidejon de la **Librecana**

Ateneo de Zaragozo. Feliĉe, oni povis eviti ĝustatempe la katastrofon. La loka gazetaro alarme informis pri la afero.

Kvankam kelkaj el niaj legantoj konsideris *tro alarmema* la ĉefartikolon de la antaŭa numero de **Kajeroj el la Sudo** kontraŭ la naziaj bandoj, kie ni denunciis la kreskantan aktivadon de tiuj krimuloj, ni, kun bedaŭro, konfirmas tiun danĝeron kaj instigas niajn gekamaradojn vigle konscii pri ĝi... Ni ripetas la saman alvokon kiel ĉe la antaŭa numero de **Kajeroj**: Ĝis kiam ni toleros tiujn bandojn?



La Redakcio

Kajeroj ————— 
— *el la Sudo*

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIU: Str. Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.
50002 - Zaragoza (Hispanio)
